

Isra'ela Esperantisto



ORGANO DE ESPERANTO LIGO EN ISRAELO (ELI)

Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004

N-ro 54. Aprilo 1975.

KIA RESTOS REMEMORO ?

Juda popolkanto

Kia restos rememoro
pri la longa voj`?
Kia restos rememoro
en tagoj de malĝoj`?

Ĉar dum juneco mi ne plantis,
por mi ne kreskas flor`.
Ĉar dum juneco mi ne kantis,
la kanto restis for.

Pasis tagoj, pasis jaroj,
vana mia preg`.
Miajn florojn, rememorojn
kovris blanka neg`.

Kia restos rememoro,
ho, mia generaci`?
Ĉu por ĉiam nur angoro,
malamo kaj envi`?

Kia restos rememoro
pri la longa voj`?
Kia restos rememoro
en tagoj de malĝoj`?

El juda lingvo tradukis J. Ben-Alter
(Represo de "Oomoto".

PROF. IVO LAPENNA

LETERO AL ISRAELAJ ESPRANTISTOJ

En Israela Esperantisto estis menciitaj la senbridaĵoj de MEM kontraŭ Israelo.

Mi konas ilin kaj ĉiam kondamnis ilin. Tamen kiel mi diris en mia eksiga teksto, oni iel povis ignori ilin el vidpunkto de UEA, ĉar ĉiam mi povis ekspliki al la aŭtoritatoj, ke MEM tute ne estas UEA. Nun mi deziras vin informi, ke ne nur MEM, sed ankaŭ la Bulgara Esperantista Asocio senbride atakis vian landon. Eĉ pli, laŭ la oficiala programo de tiu Asocio, kiun loĝala bulgara esperantisto sendis al mi post Hamburgo. La atakado kontraŭ via lando estas parto de la valida programo de tiu "neŭtrala" landa asocio, kies prezidanto Aleksiejev estis kaj restas unu el la ĉefaj komplotintoj kontraŭ la neŭtralecon de UEA. Mi citas laŭvorte el tiu ampleksa programo nur partetojn, kiuj rekte koncernas vian landon: "Estas necese likvidi ankaŭ la danĝerajn fajrujojn de milita konflikto en la Proksima Oriento. La israelaj okupantoj devas fortiri siajn armeojn el la kontraŭleĝe forrabitaj arabaj teritorioj kaj subskribi packontrakton laŭ la Konsilio de Sekureco de UN de 1967, kaj ne fari novajn aventurajn provokojn kontraŭ la teritorioj kaj loĝantaro de la arabaj landoj." p.8. Aliloke: "Same aktiva estas ankaŭ la partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la publikaj kunvenoj de MEM en Vieno, Madrido, Helsinki kaj Londono. En Madrido la ĉeftemo de la kunveno de MEM estis agreso de Israelo kontraŭ la arabaj landoj kaj progresemaj reĝimoj el ili. Kvankam la cionistoj kaj iliaj adeptoj el aliaj landoj provis refuti la tezojn de nia raporto, post donitaj aldonaj respondoj de la meritaj en la diskutado demandoj, la proponita de MEM deklaro estis unuanime akceptita". (p.33).

Tio, do, kaj multo alia estas publikita en la oficiala programo de Bulgara Esperantista Asocio, kies komitatanoj A, kune kun aliaj komitatanoj el kvar orienteŭropaj (LA entute 18) kaj iliaj politikaj aliancanoj aŭ blindigitaj ambicijuloj en la okcidenta mondo realigis siajn politikajn celojn en Hamburgo.

... Estis por mi plezuro konstati, ke ankoraŭ ekzistas neŭtralaj kaj demokrataj organizaĵoj, kiuj ne hezitas komuniki al la esperantistaro almenaŭ parteton de tiuj eventoj, kiuj kondukis al la nuna pli ol bedaŭrinda situacio.

S-ano Hans Bakker Amsterdam skribas:

.... Kun rilato al via komuniko sur paĝo 5 (n-ro 52 de I.E.) "Tre fortajn aplaŭdojn ricevis konsulo Sinjoro Kino..... Ĉu hazardo?" mi volas atentigi, ke tio ne estas hazardo. mi rajtas havi opinionon, ĉar jam pli ol 45 jarojn mi havas kontakton kiel gvidisto kun homoj de preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo.

Doktoro H. estinta prezidanto de la Esperanto Organizo skribis al mi antaŭ tri semajnoj leteron, en kiu li komunikis: "Jam delonge mi volis skribi al vi, por ke vi sciu, ke la opinio de la preskaŭ tuta loĝantaro de nia lando estas israelema. La gvidantaro tute ne, ĉar ili obeas al la politikaj kaj ekonomiaj celoj. La popolo estas gvidata de pura emo."

Kvankam mi de longe estas konvinkita pri tiu aserto, estis agrable al mi legi tion de iu, kiu staras ekster la partioj...

(Aldono de redakcio; la aŭtoro de tiu letero petis presigi la nomon kaj la landon de sia korespondanto pro facile diveneblaj kaŭzoj.)

o o o o

PROF. D-ro IVO LAPENNA HONORA MEMBRO DE ELI

La estraro de Esperanto Ligo en Israelo decidis dum la kunveno la 4-an de Marto 1975 proklami prof. d-ron Ivo Lapenna HONORA MEMBRO de ELI pro liaj atingoj por la tutmonda Esperanto-movado.

o o o o

LA SOLVO DE LA JUDA-ARABA PROBLEMO

En la disputo inter la Judoj kaj Araboj reliefigas unu centra problemo: al kiu apartenas tiu ĉi lando? Se ni respondus tiun demandon tiel, ke ambaŭ flankoj akceptus ĝin la konflikto estus solvita.

La Araboj asertas, ke Israellando (Palestino) apartenas al ili, ĉar ĝi estis sub ilia regado kaj ili estis ĉi tie antaŭe. Tiuj "konvinkoj" estas senbazaj. Multaj nacioj antaŭ la Araboj kaj post ili regis tie, post kiam la Romioj konkeris ĝin de la Judoj. De la 16-a jarcento regis tie la Turkoj kaj ĝis la jaro 1948 la Angloj.

Dum la regado de la Turkoj silentis la arabaj loĝantoj kaj neniu diris, ke ili estas aparta palestina nacio, al kiu la lando apartenas. La atakon en la jaro 1948 argumentis la arabaj ŝtatoj asertante, ke arabaj loĝantoj estas parto de la araba nacio (kaj ne aparta nacio) kaj pro tio ili havas la rajton enmiksiĝi por subteni ilin.

Dum la lastaj jaroj de turka regado estis en Palestino 689.000 loĝantoj (Araboj, Judoj kaj Kristanoj). Laŭ la kalkulo de Angloj en la jaro 1922 estis en la lando 590.000 islamanoj de ili 110.000 peduenoj. Ni ne aŭdis tiam de ili la insistojn kaj postulojn de la lando, kies granda parto estis dezerto kaj marĉoj. Post la malvenko de la Turkoj la tuta lando sur ambaŭ flankoj de la rivero Jordano estis destinita por establi la judan nacian hejmon. Falsa estas la akuzo, ke ni forprenis la arabojn an landon. Ni nenion forprenis de ili. En tiu loko estas spaco por ambaŭ nacioj. La Araboj tamen ne volis pacan komunan kunvivon. Ili volis ĵeti nin en la maron. Ili atakis niajn vilaĝojn, semis minojn kaj post establiĝo de nia ŝtato atakis nin de ĉiuj flankoj.

Ni ne devas miri, ke parto de la lokaj loĝantoj enmiksitaĵ en atakoj kaj murdoj fuĝis, post kiam la Angloj forlasis nian landon. Ili esperis, ke post la venko de Arabaj armeoj ili revenos kaj ekloĝos en la domoj de forpeltaj kaj murditaj Judoj.

La Araboj ne estis la solaj rifuĝintoj en la postmilita tempo. Pli ol 600.000 Judoj fuĝis de siaj hejmoj el ĉiuj arabaj ŝtatoj sen iuj ekonomiaj rimedoj. Per ilia forlasita riĉaĵo oni povis solvi la problemojn de la 500.000 arabaj rifuĝintoj. Samtempe estis ensorbitaj

9 milionoj forpeltaj orientgermanoj. Estas ankaŭ grandskalaj intereangoj de rifuĝintoj en Eŭropo kaj Azio. 15 milionoj de rifuĝintoj estis akceptitaj kaj absorbitaj en tiuj du kontinentoj. Nur la problemo de palestinaj rifuĝintoj ne povis esti solvita, ĉar la arabaj ŝtatoj ne estis interesitaj solvi ĝin, ĉar ili uzas tiun problemon por pravigi militon, por konkeri tiun ĉi landon.

Israelo estas la sola demokrata lando en mezoriento kaj totalitaraj kaj diktatorecaj arabaj landoj vidas en demokrata, liberala reĝimo danĝeron por siaj kruelaj absolutaj reĝimoj.

Tiuj, kiuj proklamas, ke ili reprezentas Palestinanojn "La organizaĵo por liberigi Palestinon" kun Jaser Arafat kiel ĉefo ne estis elektitaj pere de Palestinanoj. Elektis ilin la Araba Ligo de arabaj ŝtatoj. La pinta kunveno de arabaj ŝtatoj en Alĝerio en la jaro 1973 proklamis ĝin kiel solan reprezentanton de la Palestinanoj.

La "Organizaĵo por liberigi Palestinon" servas kiel komuna tegmento por ĉiuj teroristoj ne nur de palestina deveno.

La sola araba ŝtato kie la palestinoj enradikiĝis estas Jordanio. La sola racia solvo por la Palestinanoj troviĝas en la kadro de Jordania - Palestina ŝtato. Tria ŝtato inter Israelo kaj Jordanio ne estas ebla.

La paco povas esti bazita je la ekzisto de du sendependaj ŝtatoj: Israelo kaj araba Jordania Palestino oriente de Israelo. La limoj de tiuj ŝtatoj estos trakteblaj inter tiuj ŝtatoj. Tiu ĉi ŝtato povas doni la plej bonan nacian esprimon por la Jordanianoj kaj por Palestinanoj kaj flegi bonajn najbarajn rilatojn kun Israelo.

Aleksander Manor

LITERATURA ANGULO

BALADO PRI LUPO

milita Kruc-ordeno Al Sankta iris Ter', Jam buĉis en Aĥeno, Nun buĉas en Trier.	Rimarkis lupo viron Vunditan per tranĉil', Mortŝiris la martiron, Li mortu en trankvil'!
La judmasakron gvidas Pastrar'dum preĝ-sonor'; L'akiron disdividas Simpluloj kun Senjor'.	Virin' graveda spiras, En ventro-sanga vund'; La lup' ŝin mortdisŝiras Ĝis ŝia ventra fund'.
L'amas' kadavra, osta Jen kuŝas en bazar'. Ĝin enterigos poste La simpla urbanar'.	Raben' Josef', kuŝanta Sen kruroj kaj sen brak', Barakt-agonianta, Ĝin vidis en kloak'.
Ĉar krucomilitista Okupo kaj plezur' Nur estas preĝ'al Kristo, Jud-buĉoj kun tortur'.	La lupon rabbi benis Kun etendita kol': "-Bonvenon!- Ĉar ci venis Al ni laŭ Dia vol'!
Lup'unu, dion tima vivadis ĉe Trier' En arbarega, ŝima Kaverno, ĉe river'.	"La benon kaj la gracon Al tuta lup-naci', Ĉar savon kaj mort-pacon Al ni alportis ci!
Ankoraŭ korv'ne venis, Eĉ antaŭ ven'de hund', Alvenis lup' kaj svenis Pro kadavrar-abund'.	"Ci vivu ĝis multiĝos Luparo en arbar', Ĝis la homar'bestiĝos, Lupiĝos la barbar'! ...
Jen hom' ankoraŭ spiras, Buĉita ne ĝis fin', Al morto li sopiras... La lup' mortigis lin.	De tiam longa ĉeno De jaroj pasis for, Efektiviĝis beno En sia ĝusta hor':
Jen kuŝas korp' infana En agoni turment'... La pia lup', humana, Sufokis ĝis per dent'.	Je lupo degeneris La hom', - sovaĝa best'; Kaj lupoj malaperis El la arbar', sen rest'.

Ŝaul Ĉerniĥovskij
trad. J. Kohen-Cedek

LA KREINTO DE LA JUDA NACIA HIMNO

Bela kaj alloga estas la monto Herzl en Jerusalemo. De ĝia supro oni ĝuas pitoreskan panoramon de la tuta regiono. En la centra loko de monto troviĝas la tombo de Herzl, la profeto kaj la viziulo de la Juda Ŝtato. Proksime de ĝi troviĝas tomboj de herooj, kiuj falis en bataloj por realigi la vizion de Herzl. Inter la tomboj de judaj personecoj troviĝas modesta tombo sur kies ŝtona monumento estas inkrustita la nomo de Naftali Herz Imber (1856-1909), la kreinto de la poeziaĵo "Hatikva" (la espero), kiu multajn jarojn antaŭ la fondiĝo de la Juda Ŝtato fariĝis la nacia himno de la juda popolo. En la jaro 1953 oni alportis la restaĵojn de Imber al Jerusalemo, kie li trovis la eternan ripozon proksime de Herzl.

Jam ek de la infaneco la koro de la knabo Naftali estis profunde tuŝita pro teruraj pogromoj en Ruslando kaj aliloke. La knabo estis talenta kaj sprite vigla. Naskita en orienta Aŭstrujo li estis feliĉa, ĉar tie la judoj ne estis persekutitaj. Kiam Aŭstrio festis cent jarojn de kuniĝo kun Bukovino, Imber verkis poeziaĵon kaj sendis ĝin al Imperiestro Franz Josef I. Post dek jaroj li estis akceptita kiel li omaĝe de tiu patriota poeziaĵo.

Imber estis en kontakto kun judaj aktivuloj en Rumanio, vizitis judajn organizaĵojn kaj diskutadis judajn problemojn. Li ŝatis folklorajn melodiojn. Oni supozas, ke la fonto de la melodio, kiun li adaptis por "Hatikva" estis inspirita de iu rumana popola melodio. Oni povas same rimarki, ke la melodio estas same simila kun la unuaj agordoj de la simfonio "Sur bohemaj kampoj" de la Ĉeĥo Smetana. Sed ne la melodio etas grava, sed la teksto, kiu forte entuziasmigis la popolan imagon kaj vekis nacian konscion por ĝui la rajton vivi en la propra lando.

Li estis kvin jarojn en Palestino. Li vizitis multajn koloniojn prezentante literaturajn kaj amuzajn programojn. Li tre ofte vizitis la kolonion Riŝon. Lecion, kie li kun laboristoj unuan fojon kantis "Hatikva". Ĝi rapide disvastiĝis tra ĉiuj kolonioj. Pli poste la kanto entuziasmigis la korojn de la orienteŭropaj judoj, kiuj neniam ĉesis revii pri Erec (lando) Cion, Jerusalemo, kiel sonas la lastaj vortoj de la himno.

Zangvill, granda verkisto, tradukis "hatikva" al la angla lingvo.

Imber postlasis multajn verkojn, kiuj distingiĝis per multo da humoro. Tiu humoro ne forlasis lin ĝis la lastaj momentoj de lia vivo. Eĉ kelkajn tagojn antaŭ sia

morto li skribis sian testamenton: "Al la rabenoj mi lasas ĉion, kion mi ne scias kaj ne komprenas. Al miaj malamikoj mi lasas la reŭmatismen, kiu terure turmentis min dum mia vivo. Al miaj kunlaborantoj mi lasas la difektan pulmon, por ke ili skribu pli korekte. Kaj al miaj eldonistoj mi lasas la lastan kambion, kiun mi ne pagis kaj neniam plu pagos."

Kamil Perlman

LIBROJ SENDITAJ AL REDAKCIO

Merlo sur menhiro, de Albert Goodheir. Eld. Glasgova E.A. 1974. 58 p.

Pa poeto sentas sin ano de la homaro, amas kaj kompatas suferantojn, koleras kontraŭ malbonfarantoj. Lia voĉo sonas kiel voĉo de interna harmonio kaj sendependā pensado.

A.M.

Kredu Min Sinjorino de Cezaro Rossetti. Dua eldono 1974, ĉe SAT en Britio, Londono 260 p.
 Aŭtobiografia verko de verva diboĉe amuza rakontisto.

Etnografiaj Donitaĵoj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1974. 346 p.

POSTULU ELDONI ESPERANTAJN POŝTMARKOJN

En la jaro 1977 trapasos 90 jaroj de la eldono de la unua esperanta broŝuro de d-ro E.L. Zamenhof kaj 60 jaroj post lia morto. Estraro de ELI kaj JELE turnas sin al ni-aj legantoj, ke ili amase skribu leterojn kun postulo eldoni esperantaj kaj zamenhofajn poŝtmarkojn. La leteroj devas veni minimume 2 jarojn antaŭ la eldono. La adresoj:

Haŝejruth Habulai, Jafo, Sd. Jeruŝalaim 12
 " " Tel Aviv, Alenby 27
 " " Reŝovoth, Snif Hadoar, Herzel

Eksterlandanoj povas saribi angle, france kaj germane. Estus bone eldoni diversajn motivojn por tiu celo. Inter ili substreki lian judan devenon. Ju pli estos tiuj leteroj, des pli grandaj estas ŝancoj atingi nian celon. Por Israelanoj: postulu specialan formularon ĉe s.n. adresoj por propono eldoni novajn poŝtmarkojn.

TURISMA ANGULO

LA TEL-AVIVAJ VIDINDAĴOJ

Tel Avivo estas la plej vizitata urbo en Israelo, malgraŭ ĝi ne abundas je elfosaĵoj, riĉaj muzeoj aŭ grandiozaj uropartoj.

La ĉefa kaŭzo, kiu instigas la turistojn viziti Tel-Avicon estas ĝia centra situo en la lando kaj ĝia vogleco. La urbo havas du ĉefajn stratojn. Unu komerca vizitata per amaso da homoj dum la tago (Alenby str.) kaj la dua amuziga strato (Dizengof strato kaj placo) vizitata vespere kaj ĝis la malfrua nokto. Estas tie multaj kinejoj, teatro, dancejoj, bufedoj kaj restoracioj. De Dizengof placo komenciĝas Zamenhof strato kun la tabulo en hebrea kaj esperanto lingvoj sur la kinejo "Ester".

La plej grava vidindaĵo en la urbo estas elfosaĵoj en la antaŭurbo Jafo. Jafo estis jam urbo antaŭ 4000 jaroj. Krutaj, serpentumantaj kaj mallarĝaj stratetoj, ĉe kiuj staras tre malnovaj domoj okupataj per pentristoj kaj butikistoj, kiuj vendas memoraĵojn por la turistoj estas unuranga atrakcio. Estas tie ankaŭ la domo en kiu loĝis iam la "Sankta Petro" (Simon Gurskai.) Proksime estas preĝejoj romankatolika, greko-katolika kaj armena.

La muzeoj en T-A estas malgrandaj, sed ofte oni povas vidi tie riĉaĵojn pruntedonitajn de riĉaj eŭropaj kaj usonaj muzeoj.

vidindaj estas universitatoj (religia kaj laika). Ambaŭ estis konstruataj dum la lastaj 10-15 jaroj kaj funkcias kiel modernaj kaj malnovaj eŭropaj universitatoj. Ĉiu domo estas konstruita en alia stilo.

La hotela centro estas situata ĉe marbordo. Staras tie altaj kaj unuarangaj hoteloj. La gastoj povas rekte de hotelo en bankostumo iri al la plaĝo. Estas tie ankaŭ baseno kun marakvo. La bansezono daŭras de Marto ĝis Novembro, ankaŭ en la vintro la akvo ne estas malvarma kaj atingas 16-18 gradojn.

En Tel Avivo estas la plej forta esperanto centro en Israelo. Preskaŭ la tuta agado estas koncentrita en tiu urbo, malgraŭ ankaŭ en aliaj urboj kaj kibucoj troviĝas samideanoj. Ĉiu jaŭde ĉe la str. Simon Hatarsi 6 vespere kunvenas samideanoj kaj gastame akceptas eksterlandajn samideanojn.

H. Haŝler

 NI FUNEBRAS

FRIDA	DREZNER
-------	---------

Ordinare kaj kutime oni diras por la mortintoj nur laŭdajn vortojn, tamen mi aldonas, se ili meritas tion.

Jen por nia kara kaj kompatinda Frida Drezner oni povas diri nur laŭdegajn vortojn. Edzino de nia kara, ŝatata kaj fervora semideano Naŭum, de sia edziniĝo antaŭ 37 jaroj akompanis, vivis helpis sian edzon en ĉiuj direktoj kaj samtempe instigis lin. Ŝi mem lernis esperanton kaj klopodis por la disvastigo kaj progreso de nia lingvo kaj movado. Ŝi kun sia edzo dediĉis tempon kaj penon tiacele.

Estis tempo, kiam la movado estis malforta, kelkdek samideanoj subtenis la fajron kaj tenis alten la torĉon de nia movado, inter ili la ĉefan rolon havis niaj karaj samideanoj Frida kaj Naŭum. Ĉar la movado ne havis tiam la propran ejon, ili volente disponigis sian domon por ĉiusemajnaj kunvenoj. En ilia domo okazis diskutoj kaj kursoj. Ili paciencie toleris la bruon en sia domo. En ilia domo estis biblioteko, kaj ankaŭ la sekretario en ĝi agis. Frida neniam plendis, neniam rifuzis. Ŝi estas kaj restos ekzemplo de sindonema edzino kaj samideanino. Ŝia morto estas grandega perdo kaj ĉagreno por la edzo kaj por la movado. Ŝia ekzemplo kiel esperantistino estas imitinda kaj la israela samideanaro neniam forgesos ŝin kaj profunde estimas kaj honoras ŝian memoron.

D-ro J. Beňar

Ŝajnas al mi, ke tio okazis hieraŭ, kiam mi vizitis ŝin hejme. Mi memoras, ke Frida akceptis min tiam kaj ĉiujn gastojn kun kontento kaj kiel kutime kun rideto sur sia vizaĝo.

Kaj subite ŝi foriris por ĉiam kaj restigis nian karan Naŭum sola.

Ni ne forgesos, kiu ŝi estis por nia movado. Ĉu estas eble tion forgesi? Sia hejmo ja estis la nia. La unuaj kunsidoj kaj kunvenoj de la Esperanto - Ligo Palestina okazis ĉe Frida hejme. Eĉ kursoj de nia lingvo okazis ĉe ŝi. Ĉu oni povas tion forgesi?

Ni bedaŭras ŝian antaŭtempan foriron. Por ĉiam ŝi restos en nia memoro.

Tro malriĉa estas la homa lingvo, por pere de ĝi ni povu esprimi miajn sincerajn vortojn de konsolo al nia kara Naŭum pro lia neimagebla perdo.

B. A. J.

o o o o

 PRI ISRAELAJ ESPERANTISTOJ

APREZO PRO MERITOJ

Bulgara Esp. As. kaj esperanta soc. en Pazarĝik en la letero al d-ro Beňar skribas: "La anaro de nia societo, kiun vi fondis, aŭdante pri vi kaj via aktiveco por la disvastigo kaj propagando de Esperanto kaj ĝia movado unuanime decidis vin saluti kaj sendi tiun letaron-rekonon pro merito kaj bondeziri al-vi longdaŭran vivon kaj pluan laboron por nia kara Esperanto. La societo donacas al vi jaran abonon de "bulgara Esperantisto".

Subskriboj de D.K. de BEA kaj L.K. de la societo en Pazarĝik

o o o o

Prof. V. Heimlich

Naskiĝis en Budapeŝto la 11.5. 1915. Studis en Bratislava en la fama Komenski universitato. De la jaro 1967 en Israelio. En la jaro 1966-1967 en Slovakio publikigis 40-lecionan esperanto kurson en la gazeto "Pioniro" (eldonkvanto 72.000) kaj ankaŭ vortaron E-slovakian.

Instruas muzikon en mezlernejo en Herclia. Komponis pli ol 150 melodiojn por esperantaj kantoj, eldonitajn en 5 kajeroj "Bukodo". Kelkaj el tiuj kajeroj aperis ankaŭ en la revuo "Juna amiko".

o o o o

KIU SCIAS?

adreson aŭ aliajn datalojn pri esperantistino Adina Rottenberg? Ŝi estis aktiva en Jerusalemo en tridekaj jaroj kaj poste forlasis Jerusalemon. La afero estas urĝa kaj grava. Ŝi estas serĉata per malnova amiko.

Respondojn bonvolu sendi al d-ro Maŝler. T-A str. Hapardes 11.

 NIA MOVADO KAJ AGADO

 LA SKANDINAVA MONATO

Ĉiam estas interese ĉeesti la klubkunvenojn, kiuj okazas ĉiuŝaŭde vespere en Tel-Avivo.

Speciala evento estis "La skandinava monato" aranĝita okaze de la 60-a Universala Kongreso en Kopenhago 1975. Oni povis aŭskulti la prelegojn pri 4 skandinavaj landoj kaj rigardi la lumbildojn de ili. La klubejo estis bele ornamita per afiŝoj kaj skandinavaj flagetoj.

Speciale interesa estis la finna vespero, dum kiu la finna esperantistino K. Parviala, loĝanta en kibuco 6 monatojn, rakontis pri sia lando. Malgraŭ forta pluvo venis sufiĉe multaj gesamideanoj kaj aplaudis nian finnan gastinon kaj agrablan etoson kiun ŝi kaŭzis.

S-anino E.H. sciigis la ambasadojn de s.m. landoj pri tiu okazaĵo. Ŝi sendis ankaŭ sciigon pri ŝi al prezidanto de LKK en Kopenhago s-ano Kuhlmann. Ŝi ricevis respondon de Kopenhago kaj de la finna ambasado.

E.H.

o o o o

 PRELECOJ EN KLUBEJO

Danlando (prelego kun lumbildoj)	E. Haroun
Svedio : (du prelegoj)	H. Maŝler
Finnlando	K. Parviala
Norvegio (lumbildoj)	H. Maŝler
La antikva kaj moderna teatro	M. Bukovcser
La vivo en USONO	R. Alberg

o o o o

Aŝer Meir (Jafo) fariĝis dumviva membro de ELI

o o o o

 DONACOJ

Brikner Rivka (Ramat Gan)	100 lirojn
Apel Rivka (pere de d-ro Maŝler)	25 "
Familio Birnbaum (pere de d-ro Maŝler)	80 "
Eckerling Arie (pere de d-ro Maŝler)	40 lirojn

ELI dankas

o o o o

 SCIIGOJ

Nia peranto s-ano J. Ben Alter komunikas:

La prezroj por la jaro 1975 estos:

Heroldo	61 l.	Heroldo aerpoŝte	85,80 l.
Oomoto	28.60	Biblia revuo	36,00 l.
Sennaciulo	20,00	S.A.T. kun Sennaciulo	30,00
Sennacieca Revuo	6,00		

mendon kaj monon bonvolu sendi al s-ano J. Ben Alter
Petaŝ Tikvo, t.d. 379. Bank Hadoar 4-4585-4-8

o o o o

 PRELEGO

D-ro Maŝler prelegis en gimnazio Alef la 14-an de Februaro antaŭ 120 gelernantoj de la 6 -a klaso. Post la prelego la aŭskultantoj longe demandis pri la internacia lingvo.

D-ro Maŝler ricevis de direktoro koran dankleteron.

 NOVA KURSO

La 19-an de Februaro komenciĝis nova kurso en la Junulara Domo. Enskribiĝis 21 gelernantoj, plimulto gejunuloj. Malgraŭ grandaj elspezoj por informado pri la kurso, la kurso donis profiton por la LIGO. Ĝi estas la 22-a kurso, kiun gvidas d-ro Maŝler.

o o o o

 NIA BIBLIOTEKO DENOVE FUNKCIAS

En nia klubejo ĉe la strato Simon Hatarsi 6 de la horo 7.30 ĝis la 8.00 vespere oni povas prunti esperantajn librojn kaj legi ĵurnalojn. S-ano J. Giladi gvidas bibliotekon.

 PLIALTIGO DE LA KOTIZO

Dum kelkaj jaroj la kotizo de ELI ne estis plialtigita malgraŭ inflacio kaj devaluado, kiu senĉese daŭras en Israelo kaj en la tuta mondo. Speciale la prezo de papero, presado kaj poŝtelspezoj tre ŝargis nian kason. Se ni volas daŭrigi en nia movado en sama aktiveco ni devas plialtigi la kotizon de 20 ĝis 24 lirojn jare. Ni esperas, ke niaj samideanoj akceptos tiun plialtigon kiel necesan kaj daŭre subtenos nian movadon.

Se iu de samideanoj ne povas pagi la tutan sumon, li povas ĝin fari per partpagoj aŭ eĉ pagi parton de ĝi. La nepagantojn ni pripensas, ke ili ne volas partopreni en nia fortstreĉo. Pagu per aldonita ĉeko!

ELI KAJ JELI GRATULAS

Anat Zduński-Zeidemann naskis filon! Multajn jarojn da feliĉo al nia ĉiam aktiva samideanino. Ni esperas, ke denaska esperantisto plifortigos niajn vicojn.

DE LA ESPERANTA MONDO

TELEVIDA FILMO PRI D-ro ZAMENHOF

Baldaŭ estos finita filmo pri d-ro L.L. Zamenhof. La filmon pretigas pola televido. En ĝi oni vidos originalajn fotografiaĵojn de Bialistoko, de esp. muzeo en Vieno de d-ro Zamenhof kaj liaj familianoj. La filmo aŭdigas esperantajn kantojn. La filmo estos aĉetebla de aliaj TV stacioj.

o o o o

I-a ESPERANTO MONTROKONKURSO DE DIAPOZITIVOJ

Dum la ITALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos konkurso de diapozitivaj s.t. "via lando, ĝiaj moroj kaj kutimoj". Sendu 5 lumbildojn subskribitajn al la konkurso. Adreso: Esperanto-namer G., Rosandra, I-34016 Trieso Italio. Samtempe okazos literatura konkurso.

ESPERANTISTA LABORTENDARO

Junuloj 16-30 jaraj povas partopreni labortendaron en Italio en esperantista etoso, laborante 5 horojn tage. Kontaktoj kun esperantistoj en Verono. La daŭro de 2-a ĝis 16-a de Aŭgusto 1975. Prezo 5000 liretojn (ĉirkaŭ 7 usonajn dolarojn). Aliĝo ĉe Gianfrance Mollè via Leopardi, 30-A-1, 00185, Roma, Italio.

VOLAS KORESPONDI

Geknaboj 10-15 jaraj en mezgrada lernejo: Dott. prof. Dino Fabris -35013 Cittadella (PD) -borgo Bassano, I-Box 49. Italio.

o o o

Studento de universitato en Kolombio (kun israelanino). Mario Ortegón E. Calle 14 I-23 Bogota Sud-Ameriko.

o o o o

Gelernantoj 13-17 jaraj serĉas samaĝajn korespondantojn: dr.- Albert-Finckschule, 673 Neustadt-Hambach 19, Fed. Resp. Germanio.

o o o o

S-ro Danilo Lemos Martins, Rua 18 de Maio, 96400 Bage Brazil

o o o o

F-ino Rosària de Fatima Rabello, Rua Alberto Mouffron N-o 159, 27600 Valenca, Brazilio. 18 jara volas ekkoni israelon kaj Israelanojn.

o o o o

13-18 jaraj komencantoj en Dr.- Albert-Finckschule, 673 Neustadt-Hambach 19, Fed. Resp. Germanio. gelernantoj volas ekkonis israelanojn.

o o o o

Dudek jara itala fraŭlo volas amikiĝi kun geisraelanoj. Francisco Fignatelli. Casa dello Studente "Negri" V.G. Bruno 27. 35100 Padova Italio.

o o o o

Bernantino Melba Giraldo G. Secretsia Gobierno Deptal. Oficina 208. Manizales - Colombia.

o o o o

Multaj samideanoj en Japanio estas interesitaj korespondi kun Israelanoj. Se vi serĉas amikojn en malproksima oriento bonvolu skribi (aerpoŝte) al Japana Esperanto-Koresponda-Servo adreso: ĉe KLEG, Sone-nigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Aldonu al korespondpeto sciigojn pri via aĝo (proksimume,) sekso kaj pri kio vi estas interesita korespondi.

o o o o

האספרנטיסט הישראלי, בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

תל-אביב, ת.ד. 39004

חוברת 5- אפריל 1975 - בעריכת אלכסנדר מנור

E N H A V O

Kia restos rememoro?	J. Ben Alter	1
Letero al israelaj esperantistoj	I. Lapenna	2
La popola opinio	H. Bakker	3
I. Lapenna Honora Membro de ELI		3
<u>Politika trarigardo</u>		
La solvo de la juda-araba problemo	A. Manor	4
<u>Literatura angulo</u>		
Balado pri lupo	S. Ĉerņiňovskij J. Kohen-Cedek	6
La kreinto de juda nacia himno	K. Perlman	7
Libroj senditaj al redakcio		8
<u>Turisma angulo</u>		
Tel Avivaj vidindaĵoj	H. Mašler	9
<u>Ni funebras</u>		
Frida Drezner	J. Behar	10
	B. A. J.	11
<u>Pri israelaj esperantsitoj</u>		
Aprezo pro meritoj	B. E. A.	11
<u>Nia movado kaj agado</u>		
La skandinava monato	E. H.	12
Prelegoj en la klubejo		12
Donacoj		12
Sciigoj		13
De la esperanta mondo		14
volas korespondi		15

Redakta komisiono

J. Giladi

D. Wunderbaum

Redaktoro

A. Manor